

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando

Esperantobladet

Lokakuu ♦ Oktobro

5/2000



*Dolcxamar sur la scenejo
Espan lava.*

*KEFa infanĝardeno, Niko
Voloŝin instruas Larissa
kaj Karlin desegni.*



KEF-fotoj: Sakari Kauppinen & Jorma Kasanen.



*Verkisto
Liven
Dek.*



*Diligentaj helpantoj Kaija Liimatainen, Irmeli
Tanskanen kaj Anna-Liisa Heikkinen.*

**KEF-2000, p. 5-9
Kansalaisjärjestöjen
kieliongelma, s. 3
Vigla aktivado de
asocioj, p. 16-21**

Esperantolehti

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: *Aimo Rantanen*

PL 2, 40801 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ aimo.rantanen@pp.inet.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 80 mk/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 60 mk; Baltio 60 mk, aliaj landoj 80 mk.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Postisiirtotili/Postgirokonto/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; (050) 5829 248; työ/laboro: (03) 249 3313

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Seija Kettunen*

Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 ✉ kari.kettunen@pp1.inet.fi

Sekretario/Sihtööri: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Tiina Oittinen, Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi

Anna Ritämäki, Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ aritamak@ra.abo.fi

Ritva Sabelli, Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 635 902 ✉ ritva.sabelli@sfs.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Jussi Jänntti, Huuhankatu 14 B 8, 70600 Kuopio. ☎ (0400) 859 641

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (03) 348 4245 ✉ markku.saastamoinen@koti.tpo.fi

Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala. ☎ (040) 518 7242 ✉ aini.vaaraniemi@pp.inet.fi

Rahastonhoitaja/Kasisto: *Antti Mikkola*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ antti.mikkola@orion.fi

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Toimisto/Officejo: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

UEA:n pääedustaja / Ĉefdelegito de UEA: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Kansalaisjärjestöjen kieliongelma

Helsingin Sanomissa oli su 6.8.2000 Vieraskynä-palstalla diplomisosiaalipedagogin ja entisen Kansalaisareenan aktivistin Sini-Tuulia Lehtisen myös esperantistia kiinnostava puheenvuoro ”Arkuus haittaa suomalaisia kansalaisjärjestöissä”.

Jutun alussa kirjoittaja määrittelee monille hämärän termin kolmas sektori seuraavasti: ”Kolmas sektori kattaa kaiken sen toiminnan, joka jää markkinatalouden, julkisen sektorin ja perheen väliin. Tähän alueeseen kuuluvat järjestöt, yhdistykset, erilaiset vapaat ryhmät ja yksityiset aktiiviset kansalaiset.”

Tekijä jatkaa: ”Suomalaista järjestökenttää tarkasteltaessa on kansainvälisyys ollut johtohenkilöiden yksinoikeus, tapa palkita työntekijöitä. Tavallisen kansalaisen ja suorittavan tason työntekijöiden mahdollisuudet osallistua järjestöjen kansainväliseen toimintaan ovat olleet melko rajalliset.”

EU:n myötä kansainväliset kontaktit ovat toki lisääntyneet. On kansainvälisiä projekteja ja vaihto-ohjelmia, tehdään opintomatkoja ja vastavierailuja. Kansalaisjärjestöjen sekä erilaisten urheilu- ja kulttuuriseurojen peruskannattajatkin ovat joutuneet niiden kautta entistä enemmän kansainvälisiin kontakteihin.

Kieliongelma kuitenkin tuntuu olevan suuri vieroittava tekijä perusjäsenten kansainväliselle osallistumiselle. Kirjoittajan mielestä kieliongelma on niin suuri, että kolmaskin sektori kansainvälistyy pääasiassa etuoikeutettujen, koulutettujen ihmisten varassa. Tämä ei varmaankaan ole toivotta-

vaa kansalaisjärjestöjen vaikutusmahdollisuuksien lisääntymisen, niiden kansainvälisen työn tavoitteiden toteutumisen eikä yleisen demokratiankaan kannalta.

Suomalaiset eivät useastikaan vaadi tulkausta aivan pienimuotoiseen kansainväliseen toimintaan. En nyt halua mainostaa esperanton mahdollisuuksia edellisenkaltaisen ongelman ratkaisussa, vaikka mieleni tekisi.

Olisihan esperanto halpa ratkaisu joidenkin kansalaisjärjestöjen, kuten Euroopan köyhien verkoston Itacan tai Euroopan köyhyyden vastaisen verkoston EAPN:n, kieliongelmaan.

Sini-Tuulia Lehtinen päättää juttunsa: ”Joka ei osaa englantia tai jotakin muuta suurta eurooppalaista kieltä, jää kaiken ulkopuolelle. Entä sitten kaikki ne maailman ihmiset, joiden kieltä ei kirjoiteta meidän latinalaisin kirjaimin?”

Esperanton harrastajana edellä kuvattuun ongelmaan olisi yksinkertainen ratkaisu, jos kansalaisjärjestöt sitä haluaisivat. Tähän saakka esperanto on ollut marginaalikieli kontakteissa ulkomaalaisten kanssa esimerkiksi kansainvälisissä kokouksissa.

Järkevästi ajateltuna esperantoa voisi käyttää enemmän kansalaisjärjestöissä. Järkevät ja usein myös halvat ratkaisut joskus vain ohitetaan vetoamalla yleiseen mielipiteeseen, traditioihin ja realiteetteihin. Vaihtoehtoratkaisut saavat harvoin valtavirtaa taakseen. Mutta voihan sitä sentään toivoa.

Aimo Rantanen

Publikeco kaj ĵurnalisma libereco

Lastatempe, okaze de KEF, Esperanto ricevis rimarkinde multan spacon en gazetaj paĝoj kaj televida programo. La artikoloj kaj intervjuoj aperintaj estis sufiĉe pozitivaj por ke ili rezultu almenaŭ iagradan intereson. Aŭ se ne intereson veni al kurso kaj demandi pliajn informojn, almenaŭ ili certe iom plialtigis la ĝeneralan informitecon pri Esperanto. Pro tio ni devas danki la laborgrupon, kiu organizis la publicon de KEF kaj ankaŭ oficulojn de Caisa, kiuj afable helpis enŝovante informojn pri KEF en siajn informilojn.

Post KEF okazis ioma diskutado en Helsingin Sanomat pri Esperanto kaj aliaj lingvoj. Estis entute rare, ke la plej granda landa ĵurnalo allasis opiniojn pri Esperanto sur siajn paĝojn. La ĵurnalisma libereco tamen ŝajnas esti iom relativa afero. Ni scias, ke la trafa reago de Jukka Pietiläinen neniam aperis. Ankaŭ ne aperis reago sendita en la nomo de EAF. Tamen aperis reagoj kontraŭ Esperanto. Ni ne rajtas grumbli aŭ akuzi iun ajn pro tio, ĉar la redakcio havas liberan rajton aperigi la opiniojn, kiujn ĝi volas. Ankaŭ

ĝi devas iam ĉesigi surpaĝan debaton, kiu emas daŭri kaj daŭri. Iel tamen ŝajnas, ke la redaktoroj emas per iliaj decidoj direkti publikan opinion kontraŭ Esperanto. Mi ja ĝis nun ne memoras opiniartikolan serion, kiu estus finiĝinta per reago POR Esperanto.

KEF 2000 denove montris, ke en Finnlando troviĝas esperantistoj, kiuj sukcese kunlaborante organizas tutsemajnan kulturalan aranĝon. Pere de KEF ni ankaŭ fondis gravajn novajn rilatojn kun novaj instancoj. Mi esperas, ke ni povu ankaŭ estonte aranĝi kulturajn aranĝojn en Caisa.

Tiu ĉi numero estas tema numero de KEF 2000. Kaj mi certas, ke KEF-temaj artikoloj aperos ankoraŭ pli poste.

Esperantolehti espereble baldaŭ havos novorganizitan redaktantaron. Verŝajne jam la sekvonta numero estos farita de nova teamo, konsistanta tamen parte el jam konataj kontribuantoj. Mi kredas, ke per teama kunlaborado la gazeto fariĝos pli varia, pli interesa kaj pli altnivela.

Jukka Laaksonen

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna
aperas dum la jaro **2000**

Nro	Deadline/ limdato	Ilmestyy/ aperas
6	15.11	1.12

Ilmoitushinnat

Ulkopuoliset mainostajat:	Jäsenet:
1/1 sivu 600 mk	1/1 sivu 300 mk
½ sivua 400 mk	½ sivua 200 mk
1/4 sivua 250 mk	1/4 sivua 125 mk

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja.
La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Kelkaj intervjuoj dum KEF

Kim Henriksen

Kiaj estas viaj impresoj pri tiu ĉi KEF?

Unue mi volas diri, ke mi organizis du KEFojn kaj partoprenis ĉiujn. Mi pensas, ke mi mem estis en la programo en ĉiuj KEFoj escepte de unu, sed tie mi tamen faris iun prezentadon, kaj tiu ĉi KEFo estas laŭ mi la plej bone organizita. Almenaŭ oni vidas la pluevoluon de la antaŭaj KEFoj. Eĉ kvankam la organizintoj ne estis en



Kim Henriksen
dancas.

la antaŭaj, ili tiel bone informiĝis pri tiuj, ke ili daŭrigis la laboron, aldonis bonegajn erojn en la programo kaj eĉ tute novajn aferojn, ekz. pere de la poema vespero ili daŭrigis la ideon inviti verkistojn, kaj inviti eĉ tutan skolon de verkistoj estis brila ideo. Krome mi tre volas laŭdi la ejojn ĉi tie. Ili estis perfektaj laŭ mia opinio.

Kian rolon laŭ vi, artisto, havas la publiko en ĉi tiaj aranĝoj?

La publiko estas nur parto de la prezento kaj se oni bone organizas la prezentojn, programerojn, tiam la publiko bone plenigas la aferon kaj bone reagas, do la homoj reagas ankaŭ al la bona organizado.

Bertil Wennergren

Kiaj estas viaj impresoj pri tiu ĉi KEF?

Interesa demando, mi ankoraŭ nun ĉion ne digestis kaj pripensis. Mi ja estis en ĉiuj KEFoj, kiuj ĝis nun okazis, kaj tiu ĉi estas tre tre bona, organize ĉio fluis senprobleme kaj la enhavo estas tre riĉa. Eble la muzika flanko ĉi-foje iom superregis kaj mankis la teatra flanko, sed anstataŭe poezio pli forte envenis ol antaŭe. Fakte oni tamen ne komparu kia programo estas pli bona ol iu alia. Tiu ĉi KEFo estas simple tre interesa, iom alispeca ol la antaŭaj, sed tiel ja devas esti.

Kia estas laŭ vi la signifo de Kulturaj Esperanto-Festivaloj?

La signifo estas vere granda. Mi ĉiam apartenis al tiu skolo, kiu diras, ke oni devas unuavice krei enhavon por Esperantujo se oni volas varbi homojn. Oni devas unue prizorgi pri tio, ke ekzistas io, al kio varbi ilin. Do oni ne varbu homojn nur por fariĝi novaj varbistoj. Devas esti enhavo en Esperanto kaj originala kulturo estas tre grava parto de tiu.

Sabira Ståhlberg

Viaj impresoj pri la nuna KEF?

Tiu ĉi KEF estas tre bona, mi tre ŝatas, la programo estas tre altkvalita kaj la prezentoj estas bonaj.

Ĉu vi partoprenis aliajn KEFojn?

Mi ne partoprenis, sed mi partoprenis sufiĉe da movadaj aranĝoj diverspecaj por ke mi povas diri, ke mi ege ĝuas ĉi tie. Mi ŝatas tion, ke oni povas kulturumi sen devo, do estas vera ĝuo esti ĉi tie.



Saŭnoekskurso al Kiljavanranta.

Vi vivas nun en Bulgario kaj havas eldonejon tie. Bv. rakonti ion pri viaj ceteraj okupiĝoj nuntempe.

Mi estas ankaŭ verkisto, sed ĉefe mi estas redaktoro de "Kontakto", tiu ĉi estas jam la tria jaro. Do krom tio mi verkas kaj tradukas, ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en la sveda. Laŭbezone mi ankaŭ interpretas el aliaj lingvoj.

Vi havas certe tre internacian vivon, ĉu ne?

Mi eĉ ne plu pensas pri tio. Mi ricevas ĉiutage tiom da leteroj kaj retpoŝto el diversaj partoj de la mondo, ke mi ne plu pensas ĉu tio estas internacia aŭ ne. Tio simple estas por mi normaleco – komuniki ĉiutage kun almenaŭ dudeko da homoj el dudeko da landoj.

Kion vi eldonas?

Mi eldonas librojn en diversaj lingvoj, sed nun lastatempe plejparte en Esperanto. La plej freŝa libro nomiĝas "Vespermesaĝoj", kaj ĝi temas pri bombado de NATO al Jugoslavio kaj enhavas retmesaĝojn kolektitajn kune kun la kronologio de la milito. Ĝin verkis Zoran Ĉiriĉ el Jugoslavio. Ĝi estis dezirata de pluraj homoj, kiuj lastjare ricevis

liajn retmesaĝojn. Nun ni sukcesis kolekti la tuton kaj eldoni ĝin.

Lastjare aperis "Lando malekzista" de Edith Södergran kaj ankaŭ traduko de Kriŝnamurti "Libere de la konoj" fare de la franco Yves Bachimont. Krome aperis kvinlingva eta drameto de Ljubomir Trifonĉovski, "La luno kaj la cervo", mi tradukis la tekstojn en la finna kaj en la sveda, la originalo estas en Esperanto. Chris Botrill tradukis en la anglan kaj Nicolino Rossi en la italan.

Krome mi ankaŭ eldonas paperan version de la revuo "Esperantologio", kiu estas la plej scienca kaj serioza revuo momente kun tre larĝa perspektivo al esperantologio. La revuo aperas unufoje jare, sekva numero iam dum la venonta aŭtuno. Kaj antaŭ du jaroj aperis mia propra verko "Durankulak", kiu lastjare fariĝis Verko de la jaro.

Vi eĉ verkas poemojn, rakontu ion pri tio ankoraŭ.

Mi verkas poemojn kaj prozon en la sveda jam de mia infanaĝo, sed en Esperanto mi ĉiam sentis, ke miaj poemoj ne estas sufiĉe



Iberaj verkistoj en publiko.

kvalitaj. Mi havis eble iomete tradician vidpunkton pri tio, ke ili estu tre poluritaj, sed tiu poluriteco neniam sentiĝas por mi sufiĉe bona. Mi kun ĝuo legas alies poemojn, belajn kun rimo kaj ritmo kaj simile, sed mi mem ne kapablas verki tiel. Mi mem verkas tute malemajn tute senrimajn poemojn kaj sen respekti ĉiajn regulojn pri ritmo kaj similaj aferoj. Pro tio mi pensis, ke miaj poemoj ne estas sufiĉe kvalitaj por elpaŝo.

Antaŭ kelkaj tagoj Miguel Fernandez demandis, ĉu mi partoprenu kiel leganto en ampoezia vespero. Mi trarigardis la poemojn kaj diris, ke tio ne funkcias, ke mi ne povas legi alies poemojn, kiuj ne sentiĝas miaj. Ili verkas tre bele, sed mi ne povas prezenti ion kio ne sentiĝas, ke mi tute komprenas la poemon. Tiam li demandis, ĉu hazarde mi mem verkas. Mi diris, ke jes, eble mi povus verki kaj tiel mi por tiu vespero verkis tri poemojn. Evidente la akcepto estis bona,



Riitta Hämäläinen, prezidanto de KEF-teamo.

kvankam ili estis pri iom malfacilaj temoj, do du pri tio, kiel oni rigardas virinojn. La tria estis pri amo, feliĉa amo.

Tio ne signifas, ke mi vidas amon iel malfacila, sed mi preferas tuŝi temojn, kiuj estas gravaj eĉ se oni iam tabuigas ilin. Mi ne hezitas pri tiaj temoj, ĉar laŭ mi iu devas ilin eldiri kaj ne ripeti multfoje samajn belajn facilajn temojn. Eble tio devenas de la poezio de Edith Södergran, kiu estas nuntempe tre ŝatata kaj aparte inter svedlingvanoj. Mi almenaŭ de ŝi elĉerpis emon al libera formo kaj kuraĝon por diri aferojn, kiujn aliaj ne kuraĝas. Sed kompreneble mi ankaŭ ŝatas verki pri belaj aferoj.

Riitta Hämäläinen

De kie venis la ideo organizi KEFon en Finnlando nun?

Mi povus diri ion noblan kaj fajnan pri la magia jaro 2000 kaj la kultura ĉefurbeco de Helsinko... Sed la vero kaj fakto estas, ke KEF okazis en Finnlando tre hazarde. Neniom, neniom, neniel kaj nenie venis la ideo organizi KEFon en Finnlando en 2000. Mi renkontis Kim Henriksen, veteranon pri danaj KEF-oj, en la montpeliera UK 1998 kaj ŜERCE diris al li, ke eble ni finnoj devus organizi la venontan KEFon. Post kelkaj semajnoj oni preparolis la proponon de Riitta Hämäläinen en la sveda KEF kaj decidis ĝin subteni. Neniu estis same surprizita (kaj ŝokita) kiel mi aŭdante, ke la venonta KEF okazos en Finnlando laŭ la iniciato de R.Hämäläinen. Sed mi pensis, ke memkuiritan kaĉon oni brave ekmanĝu...

Ĉu la organizaj laboroj iris laŭ viaj antaŭaj supozoj?

Nu, karakterizaĵo de organizaj laboroj ĉiam estas, ke venas surprizoj kaj multo neatendita. Tiel ili neniam iras tuta laŭ antaŭaj

supozoj, sed laŭ antaŭaj supozoj estis enorma laboro organizi KEF 2000.

Kompreneble okazas ĉiuspecaj neatenditaj aferoj dum projekto kiel tiu ĉi. Kio plej multe surprizis vin pozitive aŭ negative?

La surprizoj estis preskaŭ nur pozitivaj – estis multegaj bonegaj surprizoj. Pozitive min surprizis la preto de la KEF-teamanoj preni la grandan defion kaj la entuziasmo, kiu laŭ mia takso nur kreskis dum la laboro. Same min surprizis la sindediĉemo de pluraj helpantoj. Kaj plej min surprizis la preto de plej diversaj homoj akcepti realigon de iom frenezaj, riskaj kaj grandaj projektoj por KEF. Ekz. Flo Martorell realigis la unuan fojon en esphistorio plene esperantlingvan diskejon – tio postulis grandegan antaŭlaboron. Ĉiuj niaj 4 teatraĵoj okazis pro la sufiĉa kvanto da jesaj respondoj de homoj, kiuj neniam antaŭe aktoris! La iberaj verkistoj akceptis surscenejigi mem pecon verkitan de Goncalo Neves, Sabira Ståhlberg kaj Hanna Hjelt jesis same al mia propono mem aktori kaj prezenti pecon pri Edith Södergran kaj la pleja heroaĵo: helsinkaj junaj komencantinoj ekzercis tutan jaron por prezenti en KEF du pecojn. Kaj estis multaj aliaj tiaspecaj projektoj en KEF! Ankaŭ la kunlaboro kun Caisa estis bonega sperto.

Eble la plej negativa surprizo estis, ke tiom malmultaj finnoj finfine partoprenis KEFon – mi ne bone komprenas kial. Estis nur kvardeko da finnoj inkluzivante la organizantojn mem.

Vi plej multe respondecis pri invitado de artistoj. Ĉu estis malfacile trovi bonan "sортimenton" de artistoj por KEF?

En Esperantujo troviĝas amaso da bonaj muzikaj grupoj kaj verkistoj. Estis malpli facile limigi la kvanton ol trovi bonajn. Es-

peranta teatro ne same floras kiel literaturo kaj muziko. Tiel estis tre malfacile trovi bonan teatran grupon, en kies repertuaro estus originale esperanta peco. Tiel naskiĝis la ideo pri amatoraj projektoj por KEF.

Kiam via opinio KEF denove povus okazi en Finnlando?

Hm, hm... Almenaŭ ne tuj venontjare! Ankoraŭ regas ioma postlaco. La venonta KEF ŝajne okazos refoje en Svedujo. Sed certe ni denove iam kuraĝos al nova KEF. Mi havas la impreson, ke la KEF-teamanoj ankoraŭ ne perdis la entuziasmon. Kaj espereble troviĝos estonte novaj kuraĝuloj.

Ĉu restis kelkaj ideoj realigindaj por la sekvaj KEFoj?

La mondo kaj homaj kapoj estas plenaj je ideoj realigeblaj, realigindaj kaj realigendaj. Ideoj certe neniam elĉerpiĝos. Kaj laŭ mi neniun tereno estas same virga kiel nia Esperantujo. Tiel estas tre facile trovi novajn ideojn. Ankoraŭ estas pluraj temoj kaj kampoj, kiujn oni praktike neniam traktis en renkontiĝoj aŭ aliforume. Por mencii kelkajn el nia KEF. Oni ĝis nun neniam havis komiksanan ekspozicion. Ĝis nun laŭ mia scio ne ekzistas studoj pri la temo, ĉu povas ekzisti esperanta folkloro. En KEF ni preparolis la temon. La nova finna bando Dolĉamar ankaŭ prezentas ion tute novan muzikan stilon ne aŭditan en esperantaj rondoj.

Aŭ pensu pri tio: Ĝis nun tute mankas la popularliteratura ĝenro kioskecaj amromanoj en Esperanto. Mankas preskaŭ plene originale esperanta junularliteraturo aŭ infanliteraturo. Multegaj muzikstiloj. Preskaŭ mankas satiroj. Multajn aspektojn beletrajn, parolkomunumajn, kulturajn oni neniam tuŝis. Esperantujo ofertas multon interesan kaj ankoraŭ ne ĝis tede muelitan.

KEF 2000 Ampoezia vespero

Poemoj de Sabira Ståhlberg

Grupoj estis

1 – Amrenkontiĝo

2 – Amfino

3 – Feliĉa amo

1.

*Ne rigardu min tiel!
Mi estas pli ol rozo,
Cindrulino kaj fragila feo.
Vidu min
mi havas propran cerbon
du manojn kaj du piedojn –
mi estas homo kiel vi.
Mi laciĝis esti via putino
nura pugo, piĉo kaj mamoo
Mi estas pli
Mi volas pli
Mi postulas pli
Ĉesu insulti min
Ĉesu fari el mi varon, pupon, idioton*

*Mi estas kato kun ungoj
kaj akraj dentoj*

Vidu kiel ili glimas en mallumo

Dankon

La organiza teamo de KEF 2000 plej kore dankas por subteno kaj ebligo de riĉa programo:

*Fondumo Esperanto
Edukministerio de Finnlando
FAME fondaĵo
EAF, EKH kaj FEJO
Kaj ĉiujn privatulojn, kiuj subtenis KEF-projekton.*

2.

*Estis pluva tago
Li portis ruĝan ĉemizon
havis lipharojn
kaj iom bluan rigardon.
La trinkejo havis senluman koridoron
kaj nigran necesejon
kun iom tro blua lumo
tie kuris rato
tie gutis akvo
el krano
dum mia vivo frakasiĝis
inter du manoj
inter du gamboj
sub lia stinka spiro.
Restas nur ĉifonoj
kaj akvo gutis
trideksesfoje
el likanta krano.*

3.

*De okulo al okulo mi vagis
ĝis fine mi trafis la viajn
La maro en ili
ondas je amo kaj verdas
Pri amo, vera amo
oni ne laŭte parolas*

Pro daŭra helpo kaj laboro en KEF kaj antaŭ/post KEF dankegon al:

Pipsa Ahonen, Patrik Austin, Tuomo Grundström, Anna-Liisa Heikkinen, Henry Heinonen, Hanna Helen, Leena Hirvolah-ti, Veli Hämäläinen, Erkki Kemppainen, Kari Kettunen, Maikki Kettunen, Riikka Kurki, Terhi Laaksonen, Katja Lampinen, Kaija Liimatainen, Antti Mikkola, Paula Niinikorpi, Guy Peti Peti, Jukka Pietiläinen, Vesa Pölkki, Janna Roslöf, Ritva Sabelli, Leena Tiusanen, Raimo Tuisku, Tuula Virolainen.

(Kaj al ĉiuj kies nomon pro homa forgesemo ni forgesis)

KEF-teamo

Ĉarma esperantocentro en Francio


Esperantocentro Kvinpetalo situas en malgranda vilaĝo ne malproksime de la urbo Poitiers, kien iras rektaj rapidegaj trajnoj de la flughaveno de Parizo. La centro okazigas semajnfinajn kaj semajnajn kursojn. Sylvia Hämäläinen kaj mi vizitis ĝin kaj estis tre kontentaj. Eble ankaŭ vi ŝatus koni ĝin.

La centro konsistas el kvin malnovaj ŝtondometoj ĉirkaŭ ĝardena korteto. Se vi aŭtas, lasu vian veturilon ekzemple antaŭ la proksima preĝejo, ĉar la strato "Rue du Lavoir" estas tre mallarĝa kaj Kvinpetalo ne havas parkejon. Ĉe la mallarĝa kaj malalta enirejo vin julie salutas blankaj kaj rozaj alteo-floroj. Enirinte la korton vi vidos pli da floroj: dalioj, grim pantaj rozoj, visterio* kaj multaj nekonataj al vi. Vi eble vidos katon forkuri kaj kaŝiĝi en la arbustoj. Sur la herbejo staras blankaj tabloj kaj seĝoj. Pli fore situas la legomejo. Super la dometoj flugadas hirusoj. Vidita de ekstere la loko aspektas kiel privata somerdometo aŭ malnova bieneto, sed la eno de la konstruaĵoj estas riparita kaj

adaptita al la bezonoj de kursanoj. Vi trovos vian dormoĉambron en iu intima angulo, taŭgan bibliotekon kun multo da Esperanto-libroj, festosaloneton, klasejojn, kuirejon, tre hejmecan manĝejon. Vin amike salutas la posedantoj kaj prizorgantoj, kiuj faros sian eblon por kontentigi ĉiujn. Ili estas pensiuloj, kiuj sensalajre laboras por ke la kursejo daŭre funkciu, pliboniĝu kaj eĉ iom pli grandigu.

La nomoj de la ĉambroj rakontas ion pri ĉiu ĉambro: Sekreta, Balkona, Kata, Maroka, Blua ĉambroj, Domido... La salonoj kaj klasejoj estas dediĉitaj al memorindaj esperantistoj. Ne ĉiu dormoĉambro havas propran duŝejon kaj iu situas en malalta subtegmentejo. Tie ne loĝu altaj personoj! La tuton karakterizas modesteco, taŭgeco, amema prizorgado, respekto al homo kaj naturo. La centro povas tranoktigi iom pli ol 20 kursanojn, sed se necese, pliaj kursanoj povas tranokti ĉe loka familio aŭ, se ili havas aŭton aŭ biciklon, en hotelo iom for.

Kvinpetalo okazigas semajnajn kaj semajnfinajn kursojn. Pri la ĉi-jaraj estu menciataj la kursoj literaturaj, lingvostudaj, botanika (tra la regiona flaŭro), aktorada, luda, joga kaj astronomia. Por la lasta Kvinpetalo taŭgas, ĉar neniu urba lumpolucio vualas la



*En la tombejo
de Bouresse.*

lumojn de la nokta kampara ĉielo.

Malgraŭ sia malgrandeco, la vilaĝo Bouresse (malpli ol 700 loĝantoj) havas du restoraciojn, kelkajn vendejetojn kaj unu grandan vendejon,

kiu vendas preskaŭ ĉion por domkonstruado kaj la ekipado kaj dekoraciado de hejmo. La eta poŝtofiĉejo estas malferma eĉ sabate. La romanika preĝejo kaj la malnova tombejo meritas esti vizitataj. En la horizonto ŝvebas blanka nubokolono de nuklea centralo. Ĉirkaŭ la vilaĝo sterniĝas kampoj, ŝafpaŝtejoj kaj legomĝardenoj. Tra ili oni povas piediri laŭ 35-kilometra padaro "Le Goberté" kun mapo en la mano. Antaŭe en la regiono funkciis multaj forĝejoj, kaj multloke troviĝas kapeloj aŭ ties ruinoj. Al



finno, ĉio tio estas sufiĉe ekzotika. Miaopinie indus viziti Kvinpetalon.

Saliko

*visterio – grimpanta planto kun grandaj bluaj florigrapoloj printempe kaj poste kun longaj pendantaj guŝoj.

Foto sube: Sylvia Hämäläinen.

Aliaj fotoj: Saliko.



Rezultoj de la belartaj konkursoj en 2000

La jaro 2000 ne provizis escepton al la regulo, ke la nombro de verkoj senditaj al la Belartaj Konkursoj de UEA rekte rilatas al la grandeco de la tiujara Universala Kongreso. Post la kvante kaj kvalite bonrikoltaj Montpeliera kaj Berlina jaroj, respektive kun 118 kaj 102 konkursaĵoj, en la Tel-Aviva jaro la juĝantoj devis taksati entute 69 konkursaĵojn.

La premiolisto aspektas nekutime. En poezio kaj prozo, la bazaj branĉoj de la Konkursoj, la ĵurio trovis nur po unu premiindan verkon, ambaŭ tamen meritajn por la unua premio. Aliflanke, en la esea kaj kanta branĉoj, kiuj en pasinteco ofte spertis jarojn kun neniŭ aŭ malmultaj premioj, la rezulto ĉifoje estis rimarkinda. En la esea branĉo ĉiuj verkoj ricevis premion aŭ honoran mencion, kaj en la kantobranĉo la unua premio estis asignita egale al du kantoj de sama aŭtoro.

La sola branĉo, kiu altiris pli da konkursaĵoj ol en la antaŭa jaro, estis tiu de infanlib-

roj. Partoprenis ses libroj eldonitaj en 1999. Tiu nombro ĝojigis la juĝantojn, el kiuj unu tamen domaĝis la nepremiitajn librojn, ĉar laŭ li en malpli abunda jaro pli-malpli ĉiu el ili estus povinta gajni la premion.

Kvankam la premio "Nova Talento" ne estis aljuĝita, ankaŭ en la ĉi-jara honortabelo troviĝas aŭtoroj, kiuj ne estis distingitaj antaŭe. Tamen ne ĉiuj el ili estas tute novaj talentoj: Mikaelo Giŝpling, laŭreato de la unua premio en poezio, estas jam eldonita poeto ("El sisma zono", eld. Flandra E-Ligo en 1994).

Laŭ interkonsento kun UEA, la literatura revuo "Fonto" ankaŭ ĉi-jare aperigos la premiitajn verkojn.

KANTO:

2-a premio: Anja Karkiainen kaj Vesa Pölkki (Finnlando; resp. tekso kaj muziko) pro "La koroj batu".

Gazetaraj komunikoj de UEA 88/2000

Sferoj-10 furoris ĉe KEF

La deka volumo de la serio Sferoj estis, kun granda diferenco, la libro plej mendata laŭlonge de la KEF-semajno en Helsinko, kie oni prezentis ĝin.

- 1) Sferoj-10 (sciencfikciaj rakontoj)
- 2) Ibare libere (poezio)
- 3) Ekstretoj (noveloj)

Rilate al diskoj Dolĉamar, Persone, Ĵomart kaj Nataŝa regis.

Plej vendata objekto estis bela t-ĉemizo kun teksto de Kalevala.

*Miguel Gutierrez
fonto: interredaktore*

Eŭropa jaro de lingvoj 2001

La jaro 2001 estas deklarita "Eŭropa jaro de lingvoj" de Konsilio de Eŭropo kaj Eŭropa Unio. Por pluraj informoj, vidu la retpaĝojn de la Estrejo pri edukado (Opetushallitus – Utbildningsstyrelsen): <http://www.edu.fi/projektit/kielivuosi2001/etusivu.html>

La kontaktpersono en la estraro de EAF pri la jaro estas Anna Ritamäki, Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito, Finland. Tel. (02) 423 146, fax (02) 423 246, retpoŝto: anna.ritamaki@kolumbus.fi

Premio Deguĉi al Rob Moerbeek

En la Fermo de la Tel-Aviva UK okazis por la 14-a fojo la transdono de unu el la plej prestiĝaj premioj de la Esperanto-movado, Premio Onisaburo Deguĉi de UEA. Tiu premio estis fondita en la Jubilea Jaro 1987 per kapitalo donacita de Oomoto por premii agadon de individuo aŭ organizaĵo, kiu per Esperanto antaŭenigas internacian amikecon kaj solidarecon en la spirito de la instruoj de L.L. Zamenhof kaj Onisaburo Deguĉi. La premio konsistas el diplomo kaj monsumo de 2000 eŭroj.

En 2000 la Estraro de UEA aljuĝis la Premion Deguĉi al s-ro Rob Moerbeek el Nederlando pro lia longtempa agado helpe al triamondaj esperantistoj kaj por handikapiĵoj, precipe blinduloj. Dum multaj jaroj li faris tion kune kun sia edzino Nora, forpasinta en 1998, konata aktivulo de la blindula Esperanto-movado. Profesie Rob Moerbeek jam ekde 1969 laboras en la Centra Oficejo de UEA.

Gazetaraj komunikoj de UEA 90/2000

Subvencio Cigno al Indiĝenaj Dialogoj

Ekde 1994 la Estraro de UEA asignas Subvencion Cigno al projekto, kiu kontribuas al disvastiĝo de Esperanto en la Tria Mondo. La subvencion financas la japana esperantisto Etsuo Miyoshi kaj ĝi valoras 500 000 japanajn enojn (ĉ. EUR 4900).

La ĉi-jaran subvencion ricevis la projekto Indiĝenaj Dialogoj, lanĉita antaŭ du jaroj kun la celo krei komunikan reton inter organizaĵoj de indiĝenaj popoloj per la uzo de interreto kaj Esperanto. Tiu ĉi komplete novspeca projekto estas ne nur unu el la plej

kuraĝaj sed ankaŭ unu el la plej sukcesaj Esperanto-rilataj projektoj de multaj jaroj. Ĝi ne estas movada projekto, ĉar la disvastiĝo de Esperanto ne estas ĝia celo sed rimo por realigi la celatan komunikan reton. La projekton iniciatis ges-roj Bessie Schadee kaj Sylvain Lelarge el Nederlando. Kadre de ĝi okazis jam du kursoj en Nederlando kaj regionaj kursoj en Barato, Kostariko, Burkina Faso kaj Rusio (Komilando). UEA aŭspicias la projekton ekde la komenco.

Gazetaraj komunikoj de UEA 90/2000

Hejma vortaro represita

En la Tel-Aviva UK estis venditaj la lastaj ekzempleroj de la unua eldono de "Hejma vortaro", aperinta en oktobro pasintjare. Dum naŭ monatoj estis venditaj 703 ekzempleroj. Sekve "Hejma vortaro" superis alian furoraĵon, la ZEO-libron "Monumente pri Esperanto", kies debito en la unuaj naŭ monatoj post la apero estis 644 ekz.

Por ke la populara libro estu konstante aĉetebla, UEA reprenis senŝanĝe la unuan eldonon. "Hejma vortaro" estas do daŭre havebla por la prezo de 7,50 eŭroj. Per ĝia vendado oni apogas la agadon de Rondo Familia, kiu estas komisiono de UEA por kunligi familiojn kies hejma lingvo estas Esperanto.

Gazetaraj komunikoj de UEA 90/2000

Internacia festivalo

”La plej fama aranĝo por familioj kaj personoj 25-55 jaraĝaj”, 27 decembro – 3 januaro en Trier, Germanio.

La seminariejo estas moderna, hotelsimila, kaj ofertas al vi ĉiujn ĉambrojn kun duŝo / necesejo. La kotizo inkluzivas tri manĝojn tage, la programon kaj la tradicion silvestran bufedon (bankedon), silvestran balon kaj novjaran brunĉon. – Konatiĝu jarfine kun la plej malnova urbo en Germanio, ĝuu la modernan Trier!

Ni preparas allogan programon: partoprenu dumtage en prelegoj pri kadra kaj aliaj temoj (kadra temo ĉi-jara: Esperanto kaj infanoj) aŭ paralele en kursoj, urbaj vizitoj ... En nia vespera programo ni invitas vin al distra oferto: folkloro, vinfesto, pupteatro, muziko. Kompreneble ni silvestre impone bonvenigos la novan jarmilon I.a. prelegos: prof-oj Frank, Lindstedt kaj Wandel, d-roj Barandovská kaj Corsetti. Okazos AIS-studadesio.

En nia tuttaga ekskurso (fakultative, je 30 dec 2000) ni vizitos aŭtobuse la pitoreskan mozelan valon, konatan tutmonde pro la bongustaj vinoj. Ni konatiĝos kun famaj vinvilaĝoj, vizito de vinkelo, promeno, bonveniga vinsaluto kaj tagmanĝo en bela mozela restoracio. La bileto inkluzivas la menuon, nur la trinkaĵoj aparte pagendas.

Nia etosoplana IF-gastejo Knajpo atendas vian ĉiutagan (kaj -noktan) viziton. Ĝuu la “plej faman trinkejon en Esperantujo”, niajn diversajn bierojn, vinojn kun E-etikedo, koktelojn, kafon kaj kukon... Prof. Lindstedt pri la pasintjara Knajpo: “la ŝatata babilejo de partoprenantoj plej diversaĝaj, en plej diversaj horoj de la tagnokto.”

Ni denove proponas al vi plilongigan tagon (pro organizaj kialoj okazos nur unu, do ne tri plilongigaj tagoj): partoprenu laŭdezirore plian tagkompleton (de mateno ĝis mateno), ĝi kostas nur 14 % de la resp. kotizo. Ĝuu i.a. matenan prelegon kaj posttagmezan resp. vesperan ekskurson (per privataj aŭtoj) al la najbara Luksemburgio.

Por infanoj estos aparta prizorgo kaj speciala programo (en du grupoj, por junaj infanoj kaj gejunuloj). Fakaj kunlaborantoj (i.a. edukisto) gvidas la infanan programon, gejunuloj disponas pri diskoteko. Estos ludoblecoj.

Hans-Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein, Germanio. Tel/fakso +49 5624 8007. Interreto: *www.internacia-festivalo.de*

Internacia fotokonkurso

Post la sukcesaj konkursoj en 1998 kaj 1999 la redakcio de “La Ondo de Esperanto” kaj Urala Esperantista Societo (UES) denove invitas al partopreno en la Internacia Fotokonkurso. La konkurso ne estas ligita al deviga temo.

En la konkurso rajtas partopreni ĉiu deziranta fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 10 x 15 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj unuekzemplere al ”La Ondo de Esperanto” (RU-620077 Jekaterinburg-77, ab. ja. 67, Ruslando). La fotoj devas atingi la indikitan adreson antaŭ la 15a de decembro 2000.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti enmetita slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga.

En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj, kiuj jam estis premiitaj aŭ publikigitaj.

Tripersona juĝkomisiono (la redaktoro de "La Ondo de Esperanto", komitatano de UES kaj fakulo pri fotoarto) aljuĝos maksimume tri premiojn al la laŭreatoj:

1a premio: du minimumaj ruslandaj monataj salajroj kaj abono al "La Ondo de Esperanto".

2a premio: unu minimuma ruslanda monata salajro kaj abono al "La Ondo de Esperanto".

3a premio: abono al "La Ondo de Esperanto".

Specialan premion (libroj en la Urala libro-servo kontraŭ ekvivalento de unu minimuma ruslanda salajro) ricevos la plej bona foto teme ligita kun Esperanto.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. Ruslandaj laŭreatoj ricevos monpremiojn en ruslandaj rubloj. Alilandaj laŭreatoj ricevos la monpremion per la kontosistemo de UEA en eŭroj.

La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31a de decembro 2002 uzi la ricevitaĵojn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj.

Adreso: RU-620014, Jekaterinburg-14, p.k. 162, Ruslando. Telefono: (3432) 281 711. Retadreso: <sezonoj@mail.ru>. <http://www.sezonoj.itgo.com>

fonto: ret-info

Ago-tago la 7-an de oktobro

Laŭ siatempa decido de la Estraro de UEA, la Esperanta Ago-Tago ĉiujare estas la unua sabato en oktobro. Sekve, en 2000 ĝi okazos la 7-an de oktobro.

Esperantokursoj en Karlskoga kaj Esperanto-Gården en Lesjöfors

Okazos 28.8.2000-20.12.2000. Kostas ĉ. 13850 Skr. Pli da informoj de: Karlskoga popola altlernejo 691 24 Karlskoga, Svedio, tel. 0586-64600. Pri Esperanto-Gården ankaŭ: Lennard Svensson, 0590-30909. Oni prenos en kursojn volonte lernantojn el Finnlando.

✉ Korespondi deziras

Věra Zurková el Ĉeĥio, sportema, kultur-ema mezaĝa virino. Amikino jam trovis interretan amikon en Finnlando. Ĉu Věra ankaŭ sukcesos? Eblas korespondi per kurtima aŭ reta poŝto.

Věra Zurková, ul. Fr. Hajdy 8, CZ-73000 Ostrava 3, Ĉeĥio, rete vera.zurkova@atlas.cz

Bulgara 45-jara dentistino volas korespondi kun finna geesperantisto. D-ro Konstantin Kacarov, adr.: Zahari Zograf 28 str., Samokov – 2000, Bulgario.

Andreo, pola 50-jarulo, esperantisto je 32 jaroj, volas korespondi retroŝte kun gesamideanoj el diversaj landoj. "Per reto mi volus sendi bk aŭ fotoj. Krom tio mi kolektas pm. Mi loĝas en la urbo Legnica kaj mia tuta vivo estas ligita kun urbo Bjalistoko."

Andrzej Kosinski, martinakosa@poczta.onet.pl

La estraro decidis

La estraro kunsidis la 27an de majo en Helsinko.

Estis konstatita, ke Aimo Rantanen informis sian eksiĝon el la estraro. La eksiĝo estis akceptita kun bedaŭro kaj estis decidita alvoki superfluan ĝeneralan kunvenon por okazi dum Aŭtunaj Tagoj en Iitti por elekti novan estraron anstataŭe.

La plano pri nova ĝenerala broŝuro estis akceptita.

Estis decidita subteno de 4000 FIM al rokgrupo Dolĉamar por partopreno en kultura festivalo en Francio (3000 el la kontoj de FEJO, 1000 el la Junulara Fonduso).

Estis decidita stipendio de 1200 FIM al Marja-Liisa Röntynen-Huttunen por partopreno en la elementa kurso en Valamo somere.

Estis decidita, ke la estraro havos apartan prifinancan kunsidon post sia normala kunsido en aŭgusto.

Estis decidita, ke Jorma Toropainen salutos por EAF en la UK en Tel-Avivo kaj ke Heta Kesälä anstataŭos Jukka Laaksonen kiel komitatano A tie.

Okazis diskuto pri la organizado de la redaktado de Esperantolehti kaj decidita, ke Jukka Laaksonen kolektos kaj aranĝos la materialon por EL 4/2000.

La estraro kunsidis la 26an de aŭgusto en Tampere.

La estraro akceptis proponon de Aimo Rantanen por reorganizi la redaktadon de Esperantolehti sur teama bazo.

Estis decidita, ke la abonprezoj de Esperantolehti por la jaro 2001 estu samaj kiel por la jaro 2000.

Jukka Pietiläinen informis, ke li pasigos la finon de la jaro en Britio. Estis decidita, ke anstataŭe Päivi Saarinen ĝisdatigos la hejmpaĝojn de EAF.

La estraro diskutis pri la projekto "Eŭropa jaro de la lingvoj" en la jaro 2001. Anna Ritamäki

pristudos la aferon por ke EAF partoprenu laŭ siaj eblecoj en ĝi.

La estraro akceptis la programon de Aŭtunaj Tagoj en Iitti kaj decidis, ke Vintraj Tagoj 2001 okazu en Hämeenlinna 17.-18.3.; la loko restas nedecidita.

La estraro akceptis proponon okazigi somerajn E-kursojn en tri niveloj en civitana instituto de Valamo; instruos Atilio Orellana Rojas kaj Sylvia Hämäläinen.

La estraro principe akceptis la proponon de Amerika agado de UEA sendi turneantan esperantiston el Dominikana respubliko ia. al Finnlando dum somero 2001.

La estraro decidis starigi kontaktojn al Ruslando kadre de la projekto Indiĝenaj dialogoj por subteni la projekton.

La estraro decidis kontakti kun Sigrid Kivistö pri la estonteco de la librostoko de Mendoservo Ak.

La estraro havis apartan prifinancan kunsidon la 26an de aŭgusto en Tampere.

La estraro konstatis, ke necesas revivigi kaj reorganizi Societon Nino Runeberg.

La estraro decidis fiksi la kvanton de jaraj kunsidoj en kvin, el kiuj unu estu seminarieca speciala kunsido kaj komenci internan komunikadon per regule aperantaj cirkuleroj por faciligi diskutadon kaj ebligi pli malgrandan nombron de kunsidoj.

La estraro decidis komenci studadon pri haveblaj eksteraj financaj subtenoj por ekz. Esperantolehti.

La estraro decidis pripensadi manierojn revarbi siajn iamajn membrojn kaj abonintojn de Esperantolehti.

La estraro diskutis pri eblecoj havi pliajn anoncojn en Esperantolehti; ekz. pri la lokoj de Aŭtunaj kaj Vintraj Tagoj kaj kursejoj.

La estraro diskutis pri eblecoj vigligi la vendadon de siaj eldonitaj libroj.

La estraro decidis daŭrigi pritraktadon de financa planado poste.

Esperanto-klubo de Helsinki

Renovigitaj retpaĝoj

La retpaĝoj de nia klubo estas nun komplete renovigitaj. Estas multaj novaĵoj tie:

– nova, pli facile memorebla adreso: *www.esperanto.fi/helsinki*

– nova kodado: niaj esperantaj paĝoj nun uzas unikodon. Unikodo estas la nova kodado, kiun komprenas ĉiuj modernaj komputiloj. En la praktiko tio signifas, ke la esperantaj literoj estas automate videblaj korekte sen instalado de iu aparta programo aŭ tiparoj. Tio aparte gravas por personoj, kiuj rigardas niajn paĝojn per komunaj komputiloj ekz. en bibliotekoj, universitatoj aŭ lernejoj aŭ kiuj ne scias, kiel instalati tiparojn.

– ankaŭ en la enhavo estas multaj novaĵoj; vasta fotogalerio pri Helsinki somere kaj vintre, klubaj funkciuloj, vojaĝoj de klubanoj, novaj ligoj al la plej aktualaj ttt-ejoj en Esperantujo. La paĝoj nun estas komplete dulingvaj (Esperanto/finna). Vi povas ankaŭ kontroli la temperaturon en Helsinki kaj ricevi veterprognozon por la venontaj tagoj – ĉion en Esperanto!

– ni enkondukis ankaŭ iom tabuan temon: inter niaj elektitaj ligoj (en Esperanto) estas iom vasta ligaro al retpaĝoj pri volapük, ido, interlingua kaj pluraj aliaj konstruitaj lingvoj.

Poezio de Anja Karkiainen

Finna Esperantopoezino, Anja Karkiainen, prezentos siajn verkojn dum nia poezia vespero 17.10. La vespero okazos en la oficejo kaj komenciĝos je la 18-a horo. Tradukoj kaj verkoj de Anja aperis almenaŭ en jenaj Esperantogazetoj: Esperantolehti, Fonto, Kontakto kaj Literatura Foiro.

Esperanton jatkokurssi Helsingin työväenopistossa

07003397 13 t/90 mk

Jatkokurssi alkeet auttavasti hallitseville.

lauantai 9.30-16.00

sunnuntai 10.00-15.30

Bier- kaj babilvesperoj

Ankaŭ ĉi-aŭtune ni daŭrigos niajn neformalajn bier- kaj babilvesperojn. La unua okazos 21.9. en Ruoholahti post la kultura promenado, proks. je la 19-a horo, en restoracio Dacca aŭ iu alia apud la metrostacio.

La 3-an de oktobro oni bierumos en Cotton Factory apud la oficejo, proks. je la 19-a horo.

Sekvan fojon ni kolektiĝos 31.10. je 19-a horo ĉe la oficejo por rondirado, dum kiu ni konatiĝos kun kelkaj el la plej tipaj bierrestoracioj de Kallio.

Notu ankaŭ, ke ofte post marda deĵorado en la oficejo, proks. je la 19-a horo esperantistoj kolektiĝos en apuda bierejo Cotton Factory.

Ekskurso al Nuksio

La 7-an de oktobro ni proponas konatiĝon kun unu el la plej imponaj naturrezervejoj de nia regiono: Nuksio. Ni renkontiĝos en la fervoja stacio de Helsinki kaj veturos per L-trajno je 09.38 al Espoono korusus. De tie ni veturos per buso ĝis Nuksionpää. En Nuksio ni faros proksimume kvar-horan kaj kvin-kilometran promenadon kaj revenos al Helsinki posttagmeze. Kunprenu taŭgajn vestaĵojn, precipe bonajn ŝuojn kaj piknikan manĝaĵon. Dumvoje estos ebleco hejtigi akvon kaj fari teon.

Ĉu vi ludas halhokeon?

25.11. okazos halhokea matĉo (sähly) inter esperantistoj de Porvoo kaj Helsinki. La matĉo okazos en Liikuntamylly, apud la metrostacio de Myllypuro je la 19-a horo. Antaŭ tio okazos gustumado de esperantaj manĝaĵoj kaj rigardado de filmo Incubus ĉe Jukka kaj Eeva. Antaŭanonco kaj scio pri ekzakta adreso tel. 349 7334 aŭ rete: *Jukka.vaijarvi@dinosoft.fi*

Ĉu orienten, ĉu okcidenten?

Membroj de EKH vizitis lastprintempe Nepalon. La partoprenintoj estis kontentaj pri la vojaĝo kaj deziris, ke ni aranĝu novan esperantovojaĝon.

Surbaze de prezentitaj ideoj estas preparitaj du proponoj:

1. Trajne per la transsiberia ekspreso ĝis Pekino, konatiĝo kun Pekino kaj ĉinaj esperantistoj. Du-semajna vojaĝo, unua semajno en trajno, dua en Pekino, reveno aviadile. Alia ebleco estas halti en Ulan Batoro kaj konatiĝi kun mongolaj esperantistoj.

2. Kuba Esperanto-Asocio (kaj ĝia turisma servo Keatur) bonvenigas eksterlandajn gastojn kaj proponas diversajn itinerojn, ekz. Havana urbo, Pinar del Rio, Trinidad, Santiago de Cuba, ĉiuloke esperanta ciceronado, ebleco loĝi ĉe esperantistoj.

Pluraj flugkompanioj flugas al Havano. La kosto de ambaŭ alternativoj estas je sama nivelo, du-semajna vojaĝo inter 7000-9000 markoj, depende de la flugoj kaj servoj, sen devigo.

La vojaĝoj estas planataj kaj unu estos realigita, se troviĝos sufiĉe multaj partoprenantoj. Se tio interesas vin, kontaktu dum septembro Sakari Kauppinen, tel. 6853580, retpoŝte Sakari@skau.pp.fi kaj rakontu, kiu el la du interesas vin kaj kiam vi volus veturi.

Esperantosocieto Antaŭen dum aŭtuno 2000

Aŭtunaj klubvesperoj okazos en la klubejo NESTO Satakunnankatu 30 C 6. La vesperoj okazas lunde kaj komenciĝas je la 17a. La enirejaj pordoj fermiĝas aŭtomate precize je la 17a tial bonvolu veni iomete pli frue.

En klubvesperoj ni servas kafon aŭ teon, kostas minimume 5 FIM.

9.10. OKTOBRA vespero. Ni memorados okazojn dum somero per rakontojn kaj bildojn. Ĉiuj membrojn estas bonvenajn.

6.11. NOVEMBRA vespero. Ni invitas vizitanton por rakonti kaj montri bildojn pri UK de Tel Aviv. Vizitanto estas Jorma Toropainen el Lappeenranta.

20.11. ELEKTOKUNVENO. Ni faras agadplanon por la jaro 2001 kaj elektos personojn kiuj realigos la planon. Ĉiujn membrojn oni

petas ĉeesti la kunvenon kaj doni vian forton por nia agado.

11.12. DECEMBRA vespero. Ni ludas juleton kaj tagon de Zamenhof.

Membroj sekvu "Memorliston" de Aamulehti dimanĉe, ni anoncas se ni ricevas surprizvizitantojn aŭ niaj planoj ŝanĝiĝos.

Esperanto-Societo en Turku

KONGRESA RENKONTIĜO: La 15-an de oktobro 2000 je 14.00 estos tempo aŭskulti kaj rakonti pri someraj aranĝoj. Veikko vizitis BET-aranĝon en Tallinn, Tiina kaj Leena KEF-2000 festivalon en Helsinko. Ĉar neniu el Turku partoprenis ĉi-jare la UK:n en Tel-Aviv, ni invitos Heta Kesälän kaj Aila Havian el Helsinko-regiono por rakonti al ni pri la spertoj dum, antaŭ kaj post la israela kongreso. La loko estas la konata Blua Salono en Malnova Urbodomo, kafon aŭ teon kaj kukojn vi ricevos por 10 mk.

NOVEMBRA KUNVENO: Ni vizitos la ekspozicion pri verkoj de konata finna pentristo Hugo Simberg, kiu okazos novembre en la Arta Muzeo de Turku. La konvena tago estos interkonsentata en oktobra kongresa renkontiĝo kaj informata en sekva Informilo. Notu, ke la Arta Muzeo situas provizore en la malnova observatorio sur la monteto Vartiovuori. Leena kaj Tiina ĉiĉeronos.

KRISTNASKA FESTO: Ankaŭ ĉi-jare ni renkontos en kristnaska atmosfero. Dato kaj loko estos informataj en la sekva Informilo.

CAFÉTORI RENKONTIĜOJ: Ĉiun unuan merkredon de la monato estas en kafejo Cafétori aranĝata Informa Budo ekde la 16-a. Tie estas informataj eblecojn pri uzo kaj studado de Esperanto al ĉiuj vizitantoj de la kafejo. Nun aŭtune Informa Budo malfermiĝis la unuan fojon la 6-an de septembro 2000 je 16.00 kaj sekve 4.10.2000 kaj 1.11.2000. Deĵoros estraranoj.

Kompreneble ankoraŭ eblas merkrede inter 16-18 babili en Cafétori kun geamikoj kaj aŭdi novaĵojn pri esperantujo, sed ne ĉiam deĵoras

estrarano. Bonvenon novaj kaj malnovaj Cafétori-vizitantoj!

Esperanto-kursoj

Elementaj kaj daŭrigaj E-kursoj estas aranĝitaj unufoje monate laŭ intereso de gelernantoj. La elementaj kursoj estas por komencantoj kaj ankaŭ por tiuj, kiuj volas plifortigi siajn lingvajn sciojn. Daŭriga kurso celas en plifortigo de la parolo. Kurso-kotizo estas 60 mk/semestro, por societaj membroj 50 mk.

Aliĝoj al la instruistino Tiina Oittinen, plej facile tel. 050-5494709 aŭ tiina.oittinen@pp.inet.fi

Kantado Esperante impresis

Neatenditan intereson de ĵurnalisto vekis anonceto de Esperanto-societo en Turku por la semajna aldono TREFFI de la gazeto Turun Sanomat. Temis pri prezentado de kelkaj konataj hejm- kaj eksterlandaj kantoj en Esperanto en la kafejo Cafétori la 17-an de majo 2000 je la 16.30. La raportistino invitis la societatan prezidanton Tiina Oittinen kaj la aranĝanton Anna-Liisa Ali-Simola al la kafejo por intervjuo kaj fotado. Post la du tagoj aperinta Trefffi havis sur la kovrilpaĝo foteton pri Tiina kaj Anna-Liisa kun teksto "Amase por kanti Esperante" kaj sur la interna paĝo troviĝis iom pli granda foto kaj la raporto.

Pro neatendita favoro – senpaga informado pri E-aranĝo – mi rekomendas similajn aranĝojn al ĉiuj E-kantemuloj ĉie!

*Turku 16.5.2000
Anna-Liisa Ali-Simola*

Vizito al sinagogo

La sinagogo de Turku troviĝas preskaŭ en la centro de Turku, sed tamen restis nekonata por plej multaj turkuanoj. Ĝi estas konstruita en 1912 de judaj soldatoj en la rusa armeo. Nuntempe la sinagogo estas tre malmulte uzata, ĉar nombro de judoj en Turku forte malpliiĝis. Kelkaj eĉ transloĝiĝis al Israelo kaj sekvas tie la ortodoksan tradicion de la juda leĝo. Tion kaj multajn aliajn aferojn rakontis al nia 17-membra grupo Jakob Seela, kiu mem portis la rondan ĉapeton, tipe judan, sur la kapo. En tre afabla maniero li parolis pri specialaj trajtoj de la juda religio kaj la juda kulturo. En la unua etaĝo de la sinagogo troviĝas la pli malgranda preĝoĉambro, kie ni sidis sur tradiciaj benkoj ne tre komfortaj. Etoso de historia juda tradicio regis ĉie. Ni havis ankaŭ eblecon viziti la duan etaĝon, kie troviĝas la ĉefa preĝeja salono kun balkonoj por virinoj. La ĉefa parto de la salono estas tradicie rezervita nur por viroj.

Paula Harju

Tokio-ano ricevis konatojn en Turku

Turun Sanomat publikigis interesan artikolon pri s-ino Hiroko Sugitani, "unu el la multnombraj japanaj turistoj, kiuj rondiras sur stratoj de Turku dum somera tempo. Tamen ŝi havas tute alian kialon por sia restado kompare kun ordinarnaj turistoj. Dum unu monato ŝi vagadis en la infanecregiono de lingvosciencisto Ramstedt. Fajrero de entuziasmo por sia vojaĝo Hiroko ricevis pere de esperantlingva broŝuro de Turku. Oni aranĝis en Turku ankaŭ sukcesajn in-



ternaciajn renkontiĝojn, pri kiuj japanaj partoprenantoj rakontis siajn neforgeseblajn spertojn kaj laŭdis finnojn. Tiuj esprimoj admiraj donis al Hiroko pli da entuziasmo por prepari sian vojaĝon al Finnlando.”

Retpoŝta kontaktpersono Jorma Ahomäki fariĝis por Hiroko aranĝinto de siaj veturadoj al Tallinn, Helsinki, Jyväskylä, Tampere kaj Raŭmo. Jorma estis ŝia fidinda gvidanto en Turku kaj en Naantali, kie Hiroko ĝuis Sibelius-koncerton, dum ŝipveturo al Alando kaj gastiganto en Norrskata, kie Hiroko havis eblecon saŭni.

Dum somermeza festo Varpu Karo regalis en sia hejmo al Hiroko kun amikaro tiel okule kiel stomake per belaj nacikulturaj detaloj de sia naskiĝregiono. Varpu mastrinis ankaŭ korvarman adiaŭ-vesperon por Hiroko kaj frue sekvan matenon Jorma akompanis ŝin al al flughaveno de Turku.

Ĉiuj, kiuj konatiĝis kun Hiroko ricevis de ŝi por memoro japanan truan moneron. El Tokio ŝi dankis ĉiujn perletere kaj menciis ”miaj tagoj pasigitaj en fantazia lando Finnlando forflugis rapide kiel sago, sed ili restos neforgeseblaj por ĉiam.”

El Turun Sanomat tradukis Jorma Ahomäki kaj laŭ lia rakonto skribis Anna-Liisa Ali-Simola

Jyväskylän esperantokerho

Kokoontumispaikka on vanhaan tapaan Sepänkeskuksen Protoni, mutta kokoontumispäivä on keskiviikko ja aika klo 16.30.

Lokakuun 4. Terttu Tyynelä: Vuoristolomalla Sveitsissä. Kutsumme vieraiksi myös Sveitsin Ystäviä.

Lokakuun 18. Kerhon hallitus kokoontuu.

Marraskuun 15. POIKKEAVA AIKA: KLO 18! Kerhon syyskokous. Syyskokous on kerhon uusien sääntöjen mukainen kokous, jonka tehtävänä on:

– päättää seuraavan vuoden jäsenmaksusta,

– hyväksyä talousarvio ja toimintasuunnitelma seuraavalle vuodelle

– valita yhdistyksen hallituksen puheenjohtaja, hallituksen jäsenet ja tilintarkastajat sekä – käsitellä muut hallituksen valmistelemat, kokouskutsussa mainitut asiat.

Marraskuun 26. HUOMAA: POIKKEAVASTI SUNNUNTAI, retkeilemme ”pikkujoulumaisesti” Tikkakoskelle Pellava-aitaan; jalokivi-, kauppa- ja asemuseoihin. Kokoonnumme Vapaudenkadun linja-autopysäkillä n:o 2 klo 12.30 ja jatkamme autolla n:o 22. – Pääsylippu mainittuihin museoihin maksaa yht. 30 FIM. – Paikassa toimii myös ravintola, ja useinhan noina aikoina ”menu” on jouluihin.

Joulukuun 10. SUNNUNTAI, todennäköisesti järjestöjen joulumessut.

Joulukuun 13. Mahdollisesta kokoontumisesta päätetään myöhemmin.

Blinduloj kongresis en Bulgario

La 66-a kongreso de blindaj esperantistoj (IKBE) okazis en Bulgario 5.-12.8.2000. Plovdiv, unu el la plej malnovaj urboj en Eŭropo, allogis 93 reprezentantojn el 14 landoj. Ĉi-foje neniu el Finnlando partoprenis la kongreson. La plej gravaj decidoj de IKBE-66 temis pri redaktado de Esperanta Ligilo (EL) kaj financaj aferoj. La redaktoro de EL kaj kasisto de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj) Jan Verheule el Nederlando mortis subite en junio. Kiel nova redaktoro konsentis fariĝi Attila Varro el Hungario, kaj Olena Poshivana el Ukrainio gvidos surkasedigan servon. Nova avantaĝo estas, ke ili ambaŭ estas atingeblaj retroŝte. EL estas la plej malnova internacia brajla revuo en la mondo. Ĝi aperas 10-foje en la jaro brajle, surkasede kaj retroŝte.

Ankaŭ la administracio de LIBE postulas reformon. Dume LIBE agas jam preskaŭ 50 jarojn kaj ĝia statuto bezonas aktualigon. En 2001 okazos granda balotado ĉar la estraro de LIBE demisios per plena teamo.

La 67-a IKBE okazos en Kroatio 14.-21.7. 2001, tio estas antaŭ la 86-a UK. Ĝi okazos en Zagrebo aŭ ĉe la maro en Rijeka. Tie LIBE celebras sian 50-jarigon.

Blinduloj kaj komputiloj

La nombro de blinduloj kaj malfortevidantoj, kiuj uzas komputilon, estas kreskanta ĉe ni. En Finnlando 1030 havas komputilon, kiun ili povas uzi aŭskultante aŭ brajle. El literaturo sur disketo haveblas 200 libroj.

Preskaŭ ĉiuj estraranoj de Steleto havas hejme komputilon. Nur unu trovigas ekster la kompu-

tila teknologio. La retroŝtaj adresoj de estraranoj estas en formo *antaŭnomo.familia nomo@nkl.fi*, tiel ekz. la prezidanto estas atingebla rete jene: *raimo.tanskanen@nkl.fi*

Ritva Sabelli

✉ Korespondi deziras

En Tangshana E-asocio multaj e-istoj volas korespondi kun e-istoj el diversaj landoj pri ĉiuj temoj, kaj interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtmarkojn kaj e-aĵojn. TEA, P.O.Box 3, Tangshan Hebei, 063000 Ĉinio.

Suomen esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon Ilkka Santtilalle, Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallisyhdistykset toimivat:

- ♦ Helsingissä: Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ✉ Sakari Kauppinen, sakari@skau.pp.fi
- ♦ Iisalmessa: Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi
- ♦ Jyväskylässä: Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä, (Aimo Rantanen) PL 2, 40801 Vaajakoski ☎ (014) 261 438 ✉ aimo.rantanen@pp.inet.fi
- ♦ Lahdessa: Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ✉ martti.pennanen@pp.phnet.fi
- ♦ Mikkelissä: Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkeli, (Elli Husso) Porrassalmenkatu 27 B 51, 50100 Mikkeli.
- ♦ Oulussa: Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu

- ♦ Salossa: Salon Esperantokerho / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ✉ matti.wallius@pp.inet.fi
- ♦ Tampereella: Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Rainer Arvola, Kärjäntörmä 2 E 32, 33310 Tampere, ✉ andromeda@koti.tpo.fi)
- ♦ Turussa: Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Lappeenrannassa esperanton harrastajilla ei ole järjestöä, vaan “esperantoryhmä”, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogruppo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Lisäksi Suomen Esperantoliittoon kuuluu

- ♦ Suomen opettajien esperantoliitto, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ✉ raitapy@jymy.kase.fi ☎ (06) 8637 351
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ✉ Ritva.Sabelli@sfs.fi, ☎ (09) 660 651

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan “Esperanto” kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

”Vaarallisia verbejä”

Otsikko on Rob Moerbeekin luennosta, jota kuuntelin Kvinpetalossa. Hän oli koonnut monia verbejä, joiden käyttö usein aiheuttaa virheen verbin jälkeen. Hänhän toimii mm. kielentarkastajana UEA:ssa, joten hänen kokemuksensa verbien vaarallisuudesta pohjautuu monenmaalaisiin teksteihin. Hän korosti sitä, että emme opettelisi tai opettaisi pelkkää verbiä sanana vaan myös sen, miten verbin jälkeen jatketaan lausetta. Tätä hän sanoi rektioksi. Esimerkki rektiosta: joltakulta tai jostain puuttuu jotain = *al iu mankas io. Nur la tegmento mankas al la domo. Talosta puuttuu vain katto. Al mi mankas via kompanio. Kaipaasi seuraasi.*

Otin muutamia verbejä Moerbeekin luettelosta, mutta esimerkit keksin tai etsin itse, sillä hänelle ei jäänyt aikaa antaa niitä.

KORVATA ANSTATAŬ(IG)I

Jos ihminen korvaa toisen jossain tehtävässä, niin sanotaan “*Anna anstataŭis Petran (A. eklaboris anstataŭ P.)*”. Mutta mikään ei korvaa rakkautta: “*Nenio anstataŭas amon.*” Kuitenkin katkera totuus on, että kukaan ei ole korvaamaton: “*Neniu estas neanstataŭigebla.*” Jos johtaja hankki Annan töihin Petran tilalle, niin sanotaan: “*Li anstataŭigis Petran per Anna.*” Ja jos joku korvaa rakastelun liikasyönnillä, niin: “*Ili anstataŭigis amindumadon per tromanĝado.*”

BANI ja DUŜI

tarkoittavat, että kylvetämme ja suihkutamme vaikka koiran tai lapsen, mutta jos itse käymme kylvyssä/suihkussa, niin verbi muuttuu reflektiiviseksi: “*Mi banis min.*” “*Ŝi duŝis sin.*” “*Bani sin*” tarkoittaa myös

uimassa käymistä. “*Marbano*” ja “*riverbano*” ovat Euroopassa tavallisempia kuin meidän “*lag(o)bano*”. Suomessa taas ei aina ole mahdollista “*sunbano*”. Joskus rannalla lojuu liikaa väkeä ja joku toteaa: “*Estas tro da baniĝantoj sur tiu ĉi plaĝo.*”

HARJOITELLA EKZERCI TREJNI

Ni ekzercas nin pri Esperanto. Harjoittelemme e-toa. *Ni ekzercas nin en/pri Esperanta parolado.* *Ni trejnas nin en/pri korbopilko.* Meillä on koristreenit. Jos kuoro harjoittelee laulua, niin verbi on “*provkanti*” tai “*ekzerci sin*”: *La koruso provkantas la kanton.* Näytelmän harjoitus taas on “*provludo*”.

KEITTÄÄ ja KIEHUA KUIRI, BOL(IG)I

Kelkaj geĵunuloj ne scias kuiri por si mem. Jotkut nuoret eivät osaa laittaa itselleen ruokaa. *Kiel vi kuiras la fungojn?* Miten valmistatte sienet ruuaksi? *La terpomoj ne ankoraŭ estas kuiritaj.* Perunat eivät vielä ole kypsiä. *Akvo bolas en la temperaturo de 100 gradoj.* Vesi kiehuu 100 asteessa. *Andreo boligis akvon por infuzi teon.* Andreo keitti vettä tehdäkseen teetä. (Yksinkertaisesti: *Li infuzis teon. Sed li boligis/faris kafon por la aliaj.*)

KASVA(TTA)A KRESK(IG)I

Infanoj kreskas rapide. Lapset kasvavat nopeasti. *En la dezerto kreskas nenio.* Autio- maassa ei mikään kasva. *Kelkaj homoj scias kreskigi legomojn eĉ en sablo.* Jotkut osavat kasvattaa vihanneksia hiekassakin.

Biblioteko – novakiroj

En la oficejo de EAF estas deprunteblaj donacoj:

Esperantaĵo

Werner Borman: Bona ŝanco. Dek du prelegoj pri la internacia lingvo kaj la sociaj sciencoj. La Laguna (Tenerife). MCLMXX. 246p.

Lajos Tarkony: De paĝo al paĝo. Budapeŝt 1976, 121 p. Tekstoj de i.a. Juho Baghy (1891-1967), Karlo Bodö (1903-1936), Kolomono Kalocsay (1891-1976)

Faka

Sep-dek ŝlosiloj por la Japana Civilizacio de UME-SAO-Tadao. 1987. Eldono de Japana Komisiono por la Centjara Jubileo de Esperanto 1987. 353 p.

Geografio, turismo

Muelejoj en Nederlando. Nederlando 1990. 32 p.

Lernolibroj

Interesa legaĵo. Internacia legolibro. Kompilis Ales Berka. 1967. 124 p.

Noveloj

Ivo Andric: Songo kaj maldormo sub la karpeneto. Novelkolekto. Zagreb 1972. 79 p.

Louis Beaucaire: Kruko kaj Baniko el Bervalo. Ŝercoj.

Karel Čapek: Libro de apokrifoj. Praha 1970. 105 p. Kolekto de tekstoj

Jytte Lyngbirk: Kit vivas. Haderslev 1973. 92 p. La 17-jara Kit venis en randon de haŝiŝo-fumantoj, kaj iun tagon ŝi sentas sin tiel senespera, ke ŝi decidis sin dronigi. Ken savas ŝin, kaj la du gejunuloj amikiĝas. "La bela, komprenema rakonto tenas la scivolomon de paĝo al paĝo, dum ĝi kondukas la leganton tra la diversaj medioj, kie vivas la moderna junularo."

Willy E. Risör: Tiel profunda estas la nokto. Maldecakaj anekdotoj por neprudaj legantoj

Johan Hammond Rosbach: Disko. Haderslev 1970. 109 p. Disko estas la nomo de ŝipo, kiu antaŭ jaroj regule trafikis inter Danlando kaj Groenlando.

Johan Hammond Rosbach: Verda robo. Danlando 1974. 95 p.

Tibor Sekelj: Premiitaj kaj aliaj noveloj de Tibor Sekelj. Zagreb 1974. 52 p.

Francisko Szilágyi: Trans la fabeloceano...Noveloj. Budapeŝt 1931. 135 p.

Poezio

Kjell Walraamoen, Lina Gabrielli: Ni devas vivi. Poemoj. Ascoli Piceno. La Laguna MCMLXXIV. 154p.

Romanoj

Takemo Ariŝima: Deklaracio. Leipzig 1924. 124 p.

Ina Boudie-Bakker: Surprizoj. Nederlando 1936. 206 p.

Molnár Ferenc: La knaboj de Paulo-strato. Budapeŝt 1978. 180 p.

István Nemere: La blinda birdo. Budapeŝt 1983. 118 p.

Giap Vo Nguyen: Neforgeseblaj tagoj. II parto. Hanojo 1975. 126 p.

Henryk Sienkiewicz: Tra dezerto kaj praarbaro. Varsovio 1978. 315 p.

Walter Trobisch: Mi amis junulilon. Konfidenca korespondado. Lahr-Dinglingen 1966. 140 p.

I.S.Turgenjev: Patroj kaj filoj. Åbyhöj 1973. 215 p.

INTERESI

KIINNOSTAA

Sporto ne interesas min. Urheilu ei kiinnostaa minua. *Mi ne interesigas pri sporto.* En ole kiinnostunut urheilusta.

Se Lingva angulo ne interesas vin, IGNORU ĝin. Jos kielinurkka ei kiinnostaa sinua, niin hyppää yli/ älä lue/ ole kuin sitä ei olisikaan! Mutta jos haluat käyttää juttujani jossain, niin kopioi vapaasti, kunhan mainitset lähteeksi Esperantolehtemme.

Saliko

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki



Esperantolehden yhteyskortti

Lahjatilaus _ / _ _ alkaen.

Lahjatilauksen saajan nimi ja osoite:

(Lahjatilauksen maksajan nimi ja os. kortin alaosaan)

Tilaukseni päättyy _ / _ _.

(Osoitetarra kortin alaosaan)

Osoitteeni muuttuu _ / _ _ alkaen.

(Osoitetarra kortin alaosaan)

Uusi osoitteeni on:

Kestotilaus _ / _ _ alkaen.

Tilaus _ / _ _ alkaen.

Tilaaajan, kestotilaaajan tai lahjatilauksen maksajan nimi ja osoite. Osoitetarran paikka:

Posti-
merkki

**Suomen
esperantoliitto ry./
Sihteeri**

**Siltasaarencatu 15 C 65
00530 Helsinki**

Seuraava numero ♦ Venonta Numero

Seuraava numero ilmestyy 1.12. Jutut 15.11 mennessä Aimo Rantaselle, os. PL 2, 40801 Vaajakoski, puh. (014) 261 438. Venonta numero aperos 1.12. Artikoloj ĝis 15.11 al Aimo Rantanen, adr. PL 2, FI-40801 Vaajakoski, tel. (014) 261 438.